
40
Birštonas, Litovio
BET

# Meandro I

## Ĉiutaga informilo de BET- 40 en Birštonas

*** Sabato *    2004.07.10**

**BONVENIGO**



### Bonvenon en Birštonas!


Birštonas [prononcu: Bir'ŝto-nas] estas ĉarma negranda banurbo ĉe Nemunas, ĝi situas ĉe belaj riveraj meandroj en Regiona Parko de Nemunaj Maŝoj: la rivero farinte 50 km da senbezona vojo, revenas preskaŭ al la samo loko, nur 5 km pli norde. La urbeto havas 4800 loĝantojn.

Unuan fojon Birštonas estas menciita en 1382. Ĉi tie estas kastelmonteto, sur kiu staris ligna kastelo, konstruita de grandduko Vytautas [Vi'taŭtas]. Tiun kastelon en 1414 vizitis konata franca vojaĝanto Ghillebert Lannoy. Tiutempe ĉirkaŭ Birštonas muĝis arbaregoj, plenaj de grandaj bestoj, do en la 15a jarcento la kastelo fariĝis ĉas-bieno de grandaj dukoj, apud kiu elkreskis la urbeto. En 1539 Birštonas ricevis bazaran privilegion, en 1643 estis konstruita unua preĝejo (la nuna bela gotikstila preĝejo estis konstruita en 1909).

Jam de longe estas konataj salaj fontoj de Birštonas. Ili estis esploritaj kaj oni trovis, ke la akvoj taŭgas por kuracado. En 1855 estis konstruitaj unuaj kuracejoj. En 1927 estis aranĝitaj kuracejoj per saniga koto. Krome en 1959 estis fondita turisma bazo, en 1972 - olimpika bazo de akademia remado. Vi sendube gustumos mineralajn akvojn Vytautas kaj Birutė (Birutė estis patrino de la grandduko Vytautas). Vi trovos tempon por surgrimpi kastelmonteton, viziti lokan kaj sakralan muzeojn, fari promenadon sur ĉeborda digo de Nemunas, ĝui belan naturon.

Do aktivan partoprenon en Esperanto-aranĝoj kaj bonan ripozon en la ĉarma kvieta urbeto Birštonas! Ni esperas, ke vi kunportis bonan humoron. Restas nur deziri, ke vian restadon ĉi tie akompanu bela somera vetero.

*Organiza Komitato*




**La ciferoj sur la plano indikas:**

1 Sanatorio "Versmė", kie okazos BET-40;
2 Sanatorio "Tulpė";
3 Muzeo;
4 Poŝtejo;
5 Parko;
6 Skulptaĵo "Knabino kun ŝalmo";
7 Malnova tombejo;
8 Monumento de J.Basanavičius;
9 Loko, kie dum soveta tempo estis malhonorigataj pereintaj partizanoj;
10 Muzeo de Sakrala Arto;
11 Preĝejo;
12 Monumento de Vytautas la Granda;
Ⓐ Aŭtobusa stacio.
--- Streketita linio laŭ rivera bordo (Pylimo al.) — aleo por promenado.

Busetoj de Birštonas al Kaunas veturadas ĉiun duonhoron ekde la 6a horo matene ĝis la 21a horo vespere. Ĝis Kaunas estas 40 km kaj bileto kostas 5,20 lidojn (1,50 eŭrojn).

# SALUTMESAĜO

*Estimataj neesperantistaj gastoj, karaj partoprenantoj de la 40-aj jubileaj Baltaj Esperanto-Tagoj,*

Mi scias, ke la ĉi-jara jubilea BET estas aparte multenombre vizitata. Mi ankaŭ scias, ke kelkaj baltaj landoj ĵus eniris la Eŭropan Union. Mi krome konstatis tra la jaroj, ke la Esperanto-movado en baltaj landoj organizas sin kaj laboras en malsamaj manieroj kaj en malsamaj niveloj.



*Renato Corsetti en la gazetara konferenco ĉe la litova parlamento en 2002.*

Ĉirkaŭ ĉi tiuj elementoj mi devas konstrui mian saluton, por ke ĝi ne estu la simpla bondeziro je kongresa sukceso kaj agrabla restado en Birstonas. La restado ja estos agrabla, sed mi certas ke vi utiligos la tempon ankaŭ por firmigi la bazon de la movado en viaj landoj.

Ĉe vi, en la renkontiĝ-lando, vi havas unu el plej bonaj ekzemploj de landaj movadoj. Ĝi komprenis de longa tempo, ke la kolonoj de la movado estas nur tri: informado, instruado kaj utiligado. Mi aludas, kompreneble, al la litova movado, kies agado estas fonto de envio por landoj tre pli grandaj kaj tre pli ekonomie evoluintaj. En Litovujo, evidente ne perdiĝis la espero, ke oni povas, se ne ŝanĝi, almenaŭ influi la mondon per serioza laŭplana agado.

Mia bondeziro al la kongresanoj el Latvujo kaj Estonujo, troviĝantaj inter vi, estas, ke post kelkaj jaroj oni povos diri: "Ĉu vi memoras pri la granda agado de Litovujo antaŭ la Universala Kongreso de 2005? Ĝi estas nenio kompare kun tio, kion nun oni faras en Estonujo kaj Latvujo".

Tion oni povas atingi, se oni laŭplane kaj modeste agas en harmonio kaj ĉirkaŭ unu landa organizaĵo. Ne aŭskultu la sirenojn, kiuj flustras aŭ krias, ke oni ne bezonas labori, sed oni povas ĝui sian esperantistecon kaj sukcesi sen disciplina laboro. Tio estas vera en neniu loko kaj ĉefe ne en kapitalismaj socioj.

Kion alian mi diru? Partoprenu en la laboro de la ceteraj eŭropaj esperantistoj por atingi, ke finfine Bruselo kondutu malpli sovaĝe ol iam kondutis la caro, kaj ke ĝi ne perfortu al ĉiuj la lingvon kaj la kulturon de la imperio. Bonvolu ne diri la kutiman frazon: "Jen la jam aŭdita kontraŭsona Renato!" Rigardu la faktojn kaj pensu per via kapo kaj ne per tiu de via televido! Do, bonvolu kunagi kun la ceteraj esperantistoj de Eŭropa Esperanto-Unio por ke la eŭropaj instancoj almenaŭ riguardu la eblajn demokratajn solvojn, kiel Esperanton. La kondiĉoj favoras tion en ĉi tiu momento. Pro tio ni devas agi kune kaj celkonscie. Ne ekzistas spaco por solaj kavaliroj.

Kaj fine, bonvolu lerni iom da litovaj frazoj, kiuj certe estos utilaj al vi venontan jaron okaze de la Universala Kongreso en Litovujo. Al tiu kongreso vi estas ĉiuj invitataj. UEA decidis okazigi ĝin en ĉi tiu mondoparto, ĝuste por doni la eblecon al homoj loĝantaj en la vasta regiono ĉirkaŭ ĉiuj flankoj de Litovujo renkontiĝi, amuziĝi sed ĉefe influi per siaj ideoj la estontan laboron por Esperanto.

Dum la historiistoj de Esperanto ankoraŭ debatas inter si por certiĝi pri tio, kiuj estis la landoj, kiuj pleje gravis por Zamenhof, ni, la simplaj esperantistoj, scias ke Litovujo estis unu el liaj patrujoj.

Estu ni ankoraŭ hodiaŭ indaj je la instruoj kaj agoj de tiu granda ankaŭ-litovo, Zamenhof, kiu daŭre parolis pri justeco kiel bazo por paco. La nuna mondo ankoraŭ bezonas liajn ideojn kaj ni estas nur la plenumantoj de tiuj ideoj.

Bondezirojn al la 40-a BET!

*Renato Corsetti*
*prezidanto de Universala Esperanto-Asocio*



## ATENTE TRALEGU!

**Loĝado.** Vi verŝajne jam trovis viajn ĉambrojn en domoj destinitaj por loĝado; tiuj domoj estas kvar:

1) la ĉefa domo de la administrejo (kie okazis registrado);
2) apuda domo ĉe la administrejo;
3) paroĥa gastodomo "La blanka tulipo" (Birutės str. 21);
4) sportista komunloĝejo (Birutės str. 19)

**Manĝado.** Ĉiuj partoprenantoj manĝos en la sama loko, en konstruaĵo "Reception-Registratūra" (apud fontano). Eniro en la manĝejon estas aparta, dekstre de la ĉefa. Ni ĉiuj manĝos en salono 2 sur la 2a etaĝo. Venu ĝustatempe, sen malfruiĝo, ĉe eniro donu vian manĝtalonon de tiu tago kaj manĝo, kaj eksidu ĉe tablo, kie estas libera loko.

*MATENMANĜO 8.00-9.00,*
*TAGMANĜO 13.00-14.00,*
*VESPERMANĜO 18.00-19.00.*

**Ejoj por programeroj** estas diversloke.

En domo de la administrejo (kie okazis registrado) sur la dua etaĝo estas ĉefa salono de la sanatorio 204 kaj malgranda saloneto 200; sur la tria etaĝo estas du malgrandaj salonoj 305 kaj 306. Ĉi tie okazos kursoj, baza knatiĝo kun litova lingvo k.a. programeroj. Atentu anoncojn en MEANDRO. Malantaŭ la registrejo troviĝas libroservo; ĝi funkcios de la 9a ĝis la 12a horo kaj de la 14a ĝis la 17a horo. Sur la unua etaĝo (en la koridoro antaŭ la registrejo) estas kabineto 104, kie laboras Organiza Komitato.

En Kulturcentro (Jaunimo str. 4; trovu ĝin sur la urboplano) okazos malfermo, fermo kaj ĉiuj vesperaj koncertoj. Distraj vesperoj (dancado k.s.) post la koncertoj estos organizataj en la domo ĉe la administrejo (kie loĝas parto de partoprenantoj) en salono sur la unua etaĝo.

Seminarioj de Internacia Esperanto-Instituto (IEI) kaj prelegoj de Balta Esperanta Forumo (BEF) okazos en konstruaĵo de urba magistrato (Jaunimo str. 2, apude de Kulturcentro). Enirejo estas ne la centra, sed de dekstra flanko.

**Valuton ŝanĝi** vi povas en du bankoj:

Šiaulių bankas – Jaunimo str. 3 (ĉe la Magistrato kaj Kulturcentro);

Hansabankas – J.Basanavičiaus str. 16.

## HODIAŬ


***Sabate, la 10an de julio***

Tutan tagon – registrado de venintoj.

Havante liberan tempon, promenu tra la urbeto, trovu la bezonatajn lokojn.

| | |
|---|---|
| 19:00 – 20:00 | Komuna organiza kunveno en salono 204. |
| 20:00 - 20:30 | Koncerto de pola folklora ensemblo "Kujawy" ĉe fontano. |
| 20:30 – 22:30 | Interkona vespero kun partopreno de popola ensemblo "Jieznele" de Jieznas-kulturcentro, same ĉe fontano. |

SOLENA INAUGURO DE BET-40 MORGAŬ JE LA 15:00 EN KULTURCENTRO!




***Litovio dum jarcentoj*** estas bona libro por pliriĉigi viajn historiajn sciojn pri Litovio. Ne multaj scias, ke en la 15a jarcento Litova Granda Duklando estis la plej granda eŭropa ŝtato. La libro estas ege rekomendinda por partoprenontoj de la 90a Universala Kongreso, kiu okazos en la litova ĉefurbo Vilnius, 2005.

## Poŝtaj tarifoj

| | En Litovio | Al eksterlando | |
|---|---|---|---|
| | | simpla | prioritata |
| Poŝtkarto | 0,80 | 1,00 | 1,20 |
| Letero ĝis 20 gramoj | 1,00 | 1,30 | 1,70 |
| Letero 20-100 gramoj | 1,40 | 2,90 | 3,80 |
| Registrita paketo ĝis 100 g | 3,35 | 6,20 | 7,90 |




*** Rimarko ***
Tarifo por sendaĵoj al eksterlandoj ne dependas de distanco nek de kontinento, kaj estas egala ĉu al najbara Latvio aŭ fora Aŭstralio.

## Kompara tabelo de valutoj

| Lidoj | | Eŭroj | Lidoj | | Eŭroj | Lidoj | | Eŭroj |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 0,10 | === | 0,03 | 7 | === | 2,03 | 40 | === | 11,59 |
| 0,20 | === | 0,06 | 8 | === | 2,32 | 50 | === | 14,49 |
| 0,50 | === | 0,14 | 9 | === | 2,61 | 60 | === | 17,39 |
| **1** | === | **0,29** | **10** | === | **2,90** | 70 | === | 20,29 |
| 2 | === | 0,58 | 15 | === | 4,35 | 80 | === | 23,19 |
| 3 | === | 0,87 | 20 | === | 5,80 | 90 | === | 26,09 |
| 4 | === | 1,16 | 25 | === | 7,25 | **100** | === | **28,99** |
| 5 | === | 1,45 | 30 | === | 8,70 | **200** | === | **57,97** |
| 6 | === | 1,74 | 35 | === | 10,15 | **500** | === | **144,93** |

Kurzoj de kelkaj aliaj valutoj (vendo-aĉeto en lidoj):
Usona dolaro 2,78-2,82; Britia pundo 5,10-5,22; Latvia lato 5,12-5,27;
Estonia krono 0,21-0,22; Svedia krono 0,36-0,38; Pollanda zloto 0,74-0,78;
Ĉeĥia krono 0,75-0,78; Rusia rublo 0,08-0,11.

ABONU *la revuon*
LITOVA STELO

## Kelkaj litovaj vortoj kaj frazelementoj

Saluton – **Sveiki** [svejki′]
Bonan matenon – **Labas rytas** [la′bas ri′tas]
Bonan tagon – **Laba diena** [laba′ djena′]
Bonan vesperon – **Labas vakaras** [la′bas va′karas]
Dankon – **Ačiū** [a′ĉju]; **dėkui** [de′kuj]
Multan dankon – **Ačiū labai** [a′ĉju labaj′]
Ne dankinde – **Nėr už ką** [ner uĵ ka′]
Mi petas – **Prašau** [praŝaŭ′]
Bonvolu – **Prašom** [pra′ŝom]
Mi dankas – **Dėkoju** [deko′ju]
Mi pardonpetas – **Atsiprašau** [atsipraŝaŭ′]
Pardonu – **Atleiskite** [atlejs′kite]
Ĉion bonan – **Viso labo** [vi′so la′bo]
Ĝis revido – **Iki pasimatymo** [iki′ pasima′timo]
Adiaŭ – **Sudie** [sudje′]

Jes – **Taip** [tajp]
Ne – **Ne** [ne]
Bone – **Gerai** [geraj′]
Tre – **Labai** [labaj′]
Malbone – **Blogai** [blogaj′]
Mi volas – **Aš noriu** [aŝ no′rju]
Mi ŝatas – **Aš mėgstu** [aŝ meg′stu]
Mi ne komprenas – **Aš nesuprantu** [aŝ nesuprantu′]
Kafo – **Kava** [kava′]
Teo – **Arbata** [arbata′]
Biero – **Alus** [alus′]
Kafejo – **Kavinė** [kavi′ne]
Trinkejo – **Baras** [ba′ras]
Restoracio – **Restoranas** [restora′nas]
Kiom kostas – **Kiek kainuoja** [kjek kajnŭo′ja]


La informilon redaktas Petras ČELIAUSKAS, CHOE Taesok